*Aperis en: GrKG/H 44/3, sept. 2003, p. 169*

**Protokolo de la 49a senatkunsido (43a post la oficialigo de AIS fare de la Konsilio de la XII, 52a post la fakta eklaboro) okazinta en Sibiu (RO) en la Lucian-Blaga-Universitato.**

Sabato, 22.2.2003, 14:45 h – 17:50 h,
dimanĉo, 23.2.2003, 9:30 h – 11:50 h

Ĉeestis gekolegoj Fössmeier, Frank, Holdgrün, Lewoc, Minnaja, Pennacchietti, Quednau. Kolegoj Maitzen kaj Wickström antaŭe anoncis sian neĉeeston.

**Formalaĵoj.** La protokolo de la Milana senatkunsido estas aprobita kun la jenaj ŝanĝoj (ĉiuj ŝanĝproponoj venis de la kolego Quednau): Sub la punkto *Agado en Pollando* la frazo „En tiu fondota klerigejo la instrurajtoj sekvas el la aktuala regula
ro pri kleriginstitucioj“ estu anstataŭigata per „La instrurajton havas tiuj personoj, kiuj rajtas instrui ankaŭ dum neSUSaj studadsesioj de AIS“. La Senato aprobis tion per dua voĉdonado. Restas sen ŝanĝoj la frazo „Ĉiu tia studento devas esti gvidata de efektiva membro de AIS.“ Sub la tagorda punkto *Bulgara filio, eprofesorigo de ka tiea gvidanto* aldonendas, ke ankaŭ ADoc. Lewanderska-Quednau ricevis la titolon de EProf.

**Sesioj de AIS.** Por tiu ĉi jaro la SUS en Rimini/San Marino estas jam definitive fiksita. Tie la Ĝenerala Asembleo devas elekti novan Senaton, kiu decidos pri la prezidanto.

La departemento en Sibiu komencas sian laboron en la periodo 2003/2004 kaj pro tio okazu tie enkonduka semajno ekde vendredo, 26.9.2003, ĝis sabato, 4.10.2003.

Kolego Leonov (kiel gasto por tiu ĉi punkto) proponis okazigi provSUSon en Karlovo en tiu ĉi aŭtuno. Li je koncerna demando komunikis, ke problemo pri registro de AIS-titoloj probable ne estos, sed jes pri ŝtata agnosko. Necesas tiucele kontrakto kun ŝtata instanco, emzemple universitato en Burgas. La Senato decidas okazigi en ĉi tiu jaro provSUSon en Karlovo (BG) inter SUS 26 en Rimini/San Marino kaj la enkonduka semajno en Sibiu.

**Alvokoj.** PDoc. Vera Barandovska-Frank kaj PDoc. Martin Haase estas alvokitaj de la Senato kiel AProf.

**Pri klerigejoj de AIS.** Kolegino Poláková proponis, ke AIS mem fondu klerigejon en Komárno (ekzemple en formo de asocio kun limigita respondeco). La Senato decidis, ke AIS provu daŭrigi sian laboron en Nitra/Komárno kaj alstrebu tie ŝtatan agnoskon.

La klerigejo Ruthenia intencas kunfandiĝi kun la privata klerigejo INFO al klerigejo INFO-Ruthenia, kiu probable baldaŭ estos ŝtata. Laŭ lia propono la malnova AIS-kontrakto estu transprenita al nova tiel ekestonta AIS-klerigejo. La Senato tamen proponas adapti la kontrakton, ekzemple 20 novaj studentoj jare aliĝu al AIS kun studenta legitimilo. Ekzamenoj (BUSoj) en Moskvo ankaŭ estas estonte okazigeblaj. Per aklamo la Senato subtenas la agadon.

La filio Roslavl petas pri subteno rilate siajn agadojn, precipe konfirmon konstantan kunlaboron kun AIS por enretigi klerigkibernetikan instrumaterialon. Ankaŭ tion la Senato akceptas per aklamado.

**Konstitucio.** La de la prezidanto prezentitan skriban proponon de nova konstitucio la Senato ne povis pritrakti, ĉar mankis tempo por trastudi la tekston. Tial rekomendo al la Ĝenerala Asembleo ne eblis. (Necesas tri kvaronoj da voĉoj de la Ĝenerala Asembleo por aprobi novan konstitucion.)

**Acta Sanmarinensia.** La Senato rekomendas al gekolegoj Lewoc kaj Holdgrün daŭrigi la laboron rilate al Acta Sanmarinensia. La Senato petas la Subtenan Sektoron ebligi daŭre la aperigon de tiu periodaĵo.

Protokolis:
*H. S. Holdgrün*,
Protokol- kaj Publikigofico